

# Ĉu li forpasis tro frue?

**Sub tiu ĉi titolo trideko da israelaj esperantistoj omaĝis al Claude Piron la 5-an de februaro en la Tel-Aviva Esperanto-klubo.**

**L**a vespero komenciĝis per dolĉa surprizo: terglobo kuko kun E-flageto (por Oded Gilad, estrarano de ELI, kiu samtage festis sian naskiĝtagon). Amri Wandel prelegis per komputila prezentaĵo pri la vivo kaj Esperanta mondo de Piron.

Sekvis personaj rememoroj de pluraj s-anoj (Matilda Landau, Esti Saban, Josi Ŝemer (en la foto), Aleks

Kerbel, Amri Wandel) pri renkontiĝoj kaj amikaj kontaktoj kun Claude Piron. Oni laŭtleĝis la tekston de Boris Kolker, verkitan speciale por tiu vespero, kiu rakontis i.a. pri la juda avo de Piron. Enrika Arbiv kantis la kanton pri *Gerda Malaperis*, kiun ŝi verkis en E-kurso kun la kursgvidanto Doron Modan, kaj prezentis en la koncerto dum la UK en Florenco.



Fine, nia ĉefdelegito Jehoŝua Tilleman kaj Eldad Salzman rol-legis mallongan rakonton de Piron. La verda flago kun la bildo de Piron surmure adiaŭis la klubanojn kaj bonvenigis la lernantojn de la E-kurso kiu okazis samĉambre tuj poste. Supozeble la instruisto Doron denove uzis *Gerda Malaperis...*

**Amri Wandel**